

LA POŝTISTO LA FERVOJISTO

Fakrevuo pri: poŝto, telefono, telegrafo, fervojo, tramvojo, aeronautiko, marnautiko kaj radiotelegrafo.

„Internacia Federacio de Fakorganizoj.“

(Internacia Ligo de la Ordo.)

Orig. verkita laŭ la komisiono de „La Policisto“ de Nikola Lisac helpredaktoro.

(Simpla Esperantisto traktas plej ofte nian aferon sportmaniere, amatore ĝis io alia venas al la kapo, aŭ ĝis „la ĉiutagaj zorgoj malebligas la partoprenon...“

Nia modestulo de tempo al tempo korsiĝe krias „Vivu Esperanto“, interŝanĝas sensencajn poŝtkartojn, estas ofte fervorega filatelisto kaj plej ofte... pagas nenian kotizojn kaj abonas nenian gazeton. M. Kalina.

Esperanto Triumfonta No 93.)

Enprofundigante nin en la ĝis nun atingitajn sukcesojn de la Esperanta movado kaj laboro; ni kun bedaŭro kaj seniluziigo devas konstati; ke ĉi tiuj „sukcesoj“ ne kontentigas niajn atendojn, tute ne rekomparas la pli ol tridekjarajn klopodojn kaj laborojn.

Studante la aferon; ni devas konkludi, ke nur la aplikado de ne laŭcela taktiko, ne laŭcela organizado kaj gvidado de nia movado entute, estas la ĉefa kaj nura kaŭzo de ĉi tiu nenia, malbona sukceso kaj prosperado de nia movado, nia afero. „Mi petas silenton! Ne fanfaronadu, sed sobre kaj senpasiĝe ni pritraktu la faktojn!“

Jam de la unuaj komencoj, nia movado, nia tuta afero estis devojigita de ĝia ĉefa kaj nura direkto, kaj ĝi estis kaj estas gvidata ĝis hodiaŭen direkcion malĝustan.

De la unuaj tagoj ĝis hodiaŭ nia afero estas traktata kiel „pura lingva afero“, sur tia bazo ĉiuj niaj grupoj, ĉiuj niaj societoj, asocioj, ĉiuj niaj gazetoj, revuoj k. t. p., estis

starigitaj kaj gvidataj, kun vere malmultaj esceptoj.

La celoj kaj klopodoj de ĉiuj niaj grupoj, societoj, asocioj, gazetoj, revuoj k. t. p., estis kaj estas: disvastigi nian lingvon!

Bone! Ĉi tio ja estas la finfina celo, la senĉesa revo de ĉiuj ni Esperantistoj; sed kiu inter ni, kvankam kun bedaŭro, tamen ne devus konfirmi la supre cititajn vortojn de nia eminenta samideano Sro Kalina?

Ni fine do konsideru, ke la mondo, la homaro konsistas el 99%, da pli praktikaj pli materialistaj individuoj, kaj plej bonokaze nur el 1%, da idealistoj, kiuj agadas ne el materialistaj interesoj; sed pro la ideo mem.

Certe, nerifuteblaj estas la pruvoj, ke Esperanto efike disvastigadas kaj akceladas la solidarecon, la homamon inter la popoloj; sed ni konsideru, ke ni ankoraŭ ne agadas en la mondo, homaro jam Esperanta, sed ke nia agado disvolviĝas ĝuste inter tiuj 99% de pli materialista homaro.

Nun ni konsideru, ke la hodiaŭaj pli vastaj rondoj publikaj — senescepte — ankoraŭ ne eksentis la utilon kaj bezonon de persona interrilatado, korespondado kun nekonataj personoj eksterlandaj, fremdaj laŭ siaj nacioj, fremdaj laŭ siaj rasoj, religioj, kutimoj, profesioj ktp.

Do kian efikon povas havi nia senĉesa parolado, predikado, skribado: „Lernu Esperanton!“? Vidu, centoj kaj miloj de diversfakaj, diversnaciaj, diversreligiaj scienculoj, profesioj ktp.

Tiu ĉi samtempe malnecesigas longajn klarigojn pri la ideo enhavo de ĉi tiu fakesprimado, sed ankaŭ garantias la lingve unuecan karakteron de nia estanta terminaro.

* * *

Artikolo 1.*)

Validamplekso.

1. La estanta Internacia Konvencio estas aplikata al ĉiuj transportoj de komercaĵoj efektivigataj kaŭze de rekta ŝarĝoto el la regiono de unu el la kontraktintaj ŝtatoj en la regiono de alia kontraktinta ŝtato; sur tiuj linioj, kiuj estas notitaj en la aldonita tabelo**), kun rezervo de la ŝanĝoj, kiuj estos enkondukataj konforme al la destinoj de la artikolo 58.

2. La destinoj, fiksatataj de la kontraktintaj ŝtatoj por plenumi la estantan konvencion havos la saman validon kiel la I. K. mem havas.

Artikolo 2.

Neapliko de la destinoj.

La destinoj de la estanta Konvencio Internacia ne estas aplikotaj al la transportado de jenaj objektoj:

*) Komparu kun aldono 5.

**) Tiu-ĉi tabelo ne estas publikigita ĉi-tie.

soroj, doktoroj, oficistoj, komercistoj, laboristoj k. t. p. jam lernis kaj lernas Esperanton kaj sukcese uzadas ĝin por... nu, por interŝanĝi leterojn, belajn poŝtkartojn kaj belajn poŝtmarkojn!

Vere, ĉu ĉiu vera Esperantisto, ĉiu vera homo, ne devas plorigi, vidante tiel malaltigitajn, humilitigitajn, malhonorigitajn niajn altajn, noblajn, sanktajn idealojn?

Ĉu la apostoloj de la mondlingva demando dediĉis siajn fortojn, siajn konojn, siajn vivojn; ĉu li heredigis al ni la rezulton de ilia vivlaboro, nur por ebligi al kelkaj la kontentigadon de iliaj pli, malpli sensencaj, senpraktikaj pasioj?

Ne, karaj Samideanoj, por tio niaj herooj ne studadis, ne laboris, kaj ne disvastigis nian karan Esperanton; ni mem malaltigis, malhonorigis ĝian grandan agon!

Ni rigardu niajn grupojn, niajn societojn, niajn asociojn, gazetojn, revuojn! Kion ni vidas? Vere plej milde parolante ni vidas: kontraŭsencan, kontraŭnaturan konglomeraton de plej diversfakaj scienculoj, profesoroj, doktoroj, privat-, publik- kaj ŝtatoficistoj lernantoj, komercistoj, metiistoj, laboristoj ktp.; ili ĉiuj, ĉiuj kolektigis sen elekto, sen ia sistemo, sen ia organizado kaj ni diru sincere; kiu komuna intereso, pli serioza, praktika, povas kunligadi iun anglan scienculon, kun iu germana komercisto, greka sukeraĵvendisto, finnlanda lignaĵisto, pola lernanto, japana kuriozaĵvendisto ktp. Ne, vere nenion komunan ili povas trovi, povas posedi; nur la interŝanĝadon

1. de tiuj objektoj, kies monopolo estas rezervita al la poŝto, ankaŭ, se tio nur estas en unu el la teritorioj-traitrotaj;

2. de tiuj objektoj, kiuj pro siaj ampleksoj, pezo, aŭ stato, ne konvenas al transporto, laŭ la aranĝo kaj mastrumado eĉ nur de unu el la fervojaj linioj, kiuj devas partopreni en la transportado;

3. de tiuj objektoj, kies transporto estas malpermesita pro kaŭzoj de publika ordo en eĉ nur unu el la teritorioj-traitrotaj.

Komplementa destino.

Se estas transdonitaj objektoj, kies monopolo estas rezervita al la poŝto en unu el la landoj traitrotaj, la limstacio, aŭ ĉiu alia stacio de tiu-ĉi lando havos la rajton, transdoni ĉi-tiujn objektojn al la poŝto, kontraŭ pago de la ĝistiamaj frajto kaj spezoj.

Artikolo 3.

Objektoj esceptitaj el la transportado, aŭ nur akceptataj je certaj kondiĉoj.

La reglementaj destinoj montros tiujn objektojn, kiuj, pro siaj grandaj valoroj, pro siaj specialaj statoj, aŭ pro la danĝeroj, kiujn



La Internacia Konvencio pri la transporto de komercaĵoj per fervojo. (Bern, 14. X. 1890.)

(Prova traduko de sup. sekr. ferv. E. Muthschall, Forst (Lausitz, Germanlando).)

La tuta esperanta movado minacas iom rigidigi pro la manko je fakaj terminaroj. Estas ankaŭ komprenebla, ke niaj propagandistoj ne povas sukcese labori, kiam mankas en niaj grandaj vortaroj eĉ la plej simplaj fakvortoj. Esperanto ne estas kreita por servi al kolektantoj kaj amatoroj; sed por utili en la praktika vivo de l'homaro. Por efektiviĝi ĉi tiun celon, ni fervojistoj niaparte devas krei la necesan, realan bazon, kiu sole povos ebligi la praktikan, sukcesplenan uzon de la lingvo internacia en internaciaj fervojaj aferoj. Tiu bazo estas: bona faka terminaro.

Unu el la plej bonaj rimedoj montri al internacia publiko kolekton da fakvortoj, ŝajnas al mi esti la esperantigo de fakaj, libroj, regularoj,

de poŝtkartoj, poŝtmarkoj kaj pli, malpli senencaj leteroj.

Neniama ni intencas ofendi niajn Samideanojn kolektantajn kaj interŝanĝantajn; sed ni intencas kaj devas, je la honora memoro de niaj karaj pioniroj je la honoro kaj prospero de nia kara Esperanto akcenti kaj reaktenti:

1. Esperanto ne estis kreita por plifaciligi la interŝanĝadon de poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj ktp., (kvankam ni nek intencas, nek povas malpermesi la uzadon de Esperanto ankaŭ en tiuj celoj).

2. La tiamaniera nura uzado de Esperanto kaŭzigis, ke Esperanto mem, de la plej granda parto, kiel de la oficialaj rondoj, tiel de la publiko; estas rigardata kiel sensenca, senpraktika infanaĵo, aŭ amuziĝo sen iaj praktikaj valoroj kaj utiloj.

3. Esperanto, kiel la rezultato de la mondlingva demando estis kreita por ebligi, akceladi, helpigadi la praktikajn moralajn kaj materialajn interesojn de la Esperantistoj, de la nacioj, de la popoloj, de la tuta homaro; kaj ĉefa, sankta devo kaj tasko de la Esperantistoj estas tiucele apliki kaj uzi Esperanton!

4. Nur per aplikado kaj uzado de Esperanto en praktikaj, seriozaj celoj ni montrigos al la mondo la praktikan uzeblecon, praktikan valoron kaj gravecon de Esperanto. Per nur duonjara aplikado de Esperanto en praktika vivo ni atingis jam pli grandajn sukcesojn, ol kiajn ni estus atingintaj pere la ĝis nuna tridekvinjara aplikado en sensenca korespondado kaj sistema ludado, spite centoj da gazetoj kaj revuoj, spite centoj da landaj kaj regionaj kunvenoj, spite 15 da Universalaj Esperanto-Kongresoj, k. t. p.

(Daŭrigota.)

Grava Avizo.

Ĝoje ni sciigas nian altestisman legantaron, ke la estraro de la „IAEF“ (Internacia asocio de Esperantistaj Fervojistoj) nun pritraktas kun nia redakcio pri tio, ke nia triobla fakrevuo fariĝu la oficiala organo de la tutmonda fervojista esperantistaro.

ili enhavas kontraŭ la ordo kaj sekureco de la fervoja mastrumado; estas esceptitaj el transporto internacia, laŭ la reguloj de tiu-ĉi konvencio, aŭ kies transporto estas permesata nur je certaj kondiĉoj.

I. Pri la klarigaj destinoj al la Konvencio Internacia.

Estas esceptitaj el la transporto, se ili ne sufiĉas al la kondiĉoj de la aldono 1:

1. Ĉiuj objektoj memeflamigeblaj, aŭ eksplodeblaj, kiaj estas:

- nitroglicerino, dinamito,
- aliaj eksplodeblaj aĵoj kaj la pulvoj ĉiusecaj,
- ŝargitaj pafarmiloj,
- la hidrargo eksplodanta kaj la argento kaj la oro fulmantaj, same kiel la preparaĵoj per ili faritaj,

- piroteknikaĵoj.
- piropapero,
- pikrinacidaj saloj;
- naŭzigaj, aŭ naŭzodoraj produktaĵoj.

(Daŭrigota.)



TAGNOVAĴOJ

Mexico (Meksikujo). (Ne kreu, legante la titolon, ke nia registaro jam akceptis Esperanton kiel deviga helpla lingvo en la poŝta servo. Tio estas tro bela revo por esti reala, sed almenaŭ oni okupas sin pri ĝi.)

La Ĝenerala Poŝta Direktoro S-o. Cosme Hinojosa ricevis inviton de la Sekretario de „I. L. E. P. O.“ por rekomendi al la meksikaj poŝtaj geoficistoj aliĝi al la Ligo kaj konsideri la eblon akcepti Esperanton kiel internacian oficialan helpan lingvon por poŝtaj aferoj kaj anstataŭ ĵeti la dokumenton en la ŭjon de senutilaj paperaĵoj, aŭ sendi stative ĉirkluron malpermesante la studadon de tiu „danĝera“ lingvo, kiel oni kelkloke faris; li prestigis la inviton en la oficiala gazeto de Meksika Poŝta Servo, por ke la tuta personaro povu legi ĝin kaj kuni, ke jam ekzistas internacia ligo de kolegoj, vekiĝante samtempe intereson pri Esperanto.

Komprenable, la afero estas neoficiala, sed tamen ĝi multe helpas la propagadon de Esperanto.

En Tampico, kelkaj komizoj de la Poŝticejo jam entuziasmiĝis por starigi grupon por la lernado kaj propagado de Esperanto, kaj ni esperas ke en aliaj urboj oni penos fari ion por montri, ke same kiel ni ĉiam estis akceptintaj novajn ideojn, ankaŭ ni estas kapablaj kompreni la altajn celojn de Esperanto rilate al la tutmonda frata interkompreniĝo.

Niajn dankesprimojn al S-o. Hinojosa por lia ĝentileco helpi nian propagadon. *Ernesto E. Guerra.*

Reichenberg (Ĉeĥosl.). En la tie aperanta poŝtaka revuo „Gewerkschaft der Postler“ (No 11-a) aperis germanlingva alvoko pri Esperanto. La nomita revuo volonte sciigas pri Esp. poŝtmovado.

Würzburg. Nia tiea kara frato; *So H. Ripper*, la sekretario de llepo honorigis nian revuelon per kunlaborado. Nomita frato treege multon laboris por llepo. Amasoj de siaj leteroj superŝutis la terĝobon ĉe propagadante llepon. En la akirita bela, granda sukceso grandan parton rezultis sia memferema laboro.

Liège (Belgujo). Samideano nia, *So Derigat*, pri kiu ni jam parolis, kurson gvidos baldaŭ, ankaŭ al poŝtistaj, telegrafistaj kaj telefonistaj kolegoj. Bonan sukceson.

Warszawa (Polujo). La oficiala bulteno de la poŝta ministerio publikigas ministran ordonon (No 287/8), kiu rekomendas al polaj poŝticejoj la studadon de Esperanto kaj sciigas pri malfermo de korespondkurso.

München (Bav.-Germ.). So J. Jacob, nia tiea fervorega poŝtista frato nun komencas por nia tiea poŝtist-esperantista fratgrupo la ripetan kurson. Nijaj poŝtistaj kaj policistaj tieaj fratoj korege kunlaboras. La adreso de nia tiea fratgrupo estas: So J. Jacob, poŝticejo, München, 2., N. W. 10., Blütenburgstr. No 17/A. (Bav.-Germ.)

Jugoslavujo. Monata Raporto, Oktobro 1922. Dum la monato oktobro la sudslava ŝtata sekcio de llepo subetendis petojn por helpigado de nia afero kaj agado al:

Sro Ministro de Poŝtoj kaj Telegrafoj en Beograd, al Sroj direktoroj de poŝt. kaj telegrafdirektoj en: Beograd, Cetinje, Ljubljana, Sarajevo, Skoplje, Split, Novi-Sad kaj Zagreb.

Similajn leterojn kun aldono de mallongaj artikoloj por publikigo en la nacilingvaj organoj de p. t. t. organizoj la S. S. sendis al la komitatoj de p. t. t. organizoj en: Beograd, Cetinje, Ljubljana, Sarajevo, Zagreb.

En la „Naŝ Glas“ (Nia Voĉo), organo de Unniĝo de publikaj oficistoj, aperanta en Zagreb aperis en No 42 de 19-an de oktobro, longa artikolo verkita de Sro Lisac, prezidanto de Sudslava Ŝtata Sekcio de llepo, en kiu artikolo li pritraktas la gravan signifon de Esperanto precipe kiel interkompreniĝo kaj interligilo de la organizoj de publikaj oficistoj diverslandaj, tutmondaj en unu, ĉiujn landojn, tutan mondajn ampleksantan „Federacion de internaciaj Fakorganizoj“. En ĉi tiu artikolo la skribinto alvokis ĉiujn sudslavajn publikajn oficistojn agadi je la starigo de Ŝtataj Sekcioj laŭ la unuopaj fakoj kaj profesioj. La menciita redakcio presis la artikolon kaj de siaflanke alvokis la legantaron pridiskutiĝi kaj pritrakti la „aktualan demandon“.

Post ĉi tiu artikolo la menciita samideano sendis al la sama redakcio artikolojn:

1. „Esperanto i Poŝtari“ (Esperanto kaj la Poŝtistoj) pri „Internacia Ligo de Esp. Poŝticejoj“ 2. „Edukista Internacio“ (Traduko el ET No. 106) 3. „Polico kaj Esperanto“ (pri la „Tutmonda Polica Ligo“, resumante la plej gravajn aferojn el „La Policisto“ No. 4—6).

(Rimarko: al ĉiuj leteroj li aldonis ekzempleron de „La Policisto“ kun ĝia aldono „La Poŝtisto“). Laŭ instigo de samideano Lisac, Sro Jene Griesz, impostoficisto en Gradačac, Bosnujo (komencanto) la 1-an de oktobro kunvenigis kelkajn diversfakajn kolegojn oficistojn, preparolis la aferon-kaj starigis Esp. grupon, aliĝis tuj 11 membroj (4 impostoficistoj; 2 poŝticejoj; 3 geometroj kaj katastroficistoj, 1 juĝisto kaj 1 komercisto). La grupo komenciis Esp. kurson, abonis diversajn Esp. gazetojn kaj nun estas kolektanta Esp. librojn por Esp. biblioteko. Sub la prezidantado de nia ŝatata fervora nova samideano Sro Griesz la grupo vigle agadas kaj bele prosperadas. Jam post 15 tagoj

de ĝia starigo pluaj 8 personoj aliĝis. Ĉi tiu grupo „La Unua Stelo“ estas la unua postmilita (kaj nun ekzistanta) grupo en Bosnio kaj Hercegovino. — Koregan dankon al nia fervora samideano Sro Griesz.

La Sudslava Ŝtata Sekcio de llepo subetendis por pritraktado jenajn punktojn al la deligitoj de llepo (gvidantoj de distrikta Sekcioj):

1. La jara kotizo estas 40 din. pagebla per partopagoj po 10 din. dum la unuaj 4 monatoj de la tago de aliĝo resp., de komenco de la nova jar. 2. La kotizojn enkasigadas la distrikta deligitoj de llepo, kaj transigadas ilin monate kune kun la rilata kalkulo kaj „Membrolisto“ al la prezidanto de Ŝtata Sekcio. 3. Ĉiu membro ricevas senpage la Ligan fakrevuon „La Poŝtisto“ resp. „La Policisto“. 4. 10 din. de la kotizo (ĉe partopago de la laste pagita parto) restas en la „Distrikta kaso“ kiel „Distrikta kotizo“. El ĉi tiu kaso la Distr. Sekcio pagadas siajn elspezojn, subvencadas anojn vojaĝantaj al kongresoj ktp. 5. Membro, kiu plejmalfrue 6 monatoj post sia aliĝo ne estas paginta la tutan kotizon — estas rigardata kiel eliginta kaj ne rajtas postuli repagon de la jam pagita mono. 6. Monate plejmalfrue ĝis la 20-an, la distrikta deligitoj raportadas pri sia agado, sukcesoj, pli gravaj okazintaj ktp. al la prezidanto de la Ŝtata Sekcio. 7. „Car la Ŝtata Sekcio posedas nenian enpezojn sed sufiĉe da elspezojn, la distrikta kaso subtenadas la Ŝtatan Sekcion per 10% de la „Distrikta kotizo“.

Statistiko pri la Esp. movado inter la p. t. t. oficistoj en Sudslavo:

1. Distrikta Sekcio de llepo por Dalmatujo (Delegito Sro Ante Margetiĉ, Split): 37 gekolegoj ĉe 15 p. t. t. oficistoj de tiuj 11 llepanoj; 2. D. S. de llepo por Bosnujo kaj Hercegovinujo (Delegito Sro Leo Birnbaum, Modriĉa) 31 gekolegoj ĉe 25 p. t. t. oficistoj; 5 llepanoj; 3. D. S. de llepo por Kroatujo kaj Slavonujo. (Del. Sro Milan Klem, Osijek.) 3 gekolegoj ĉe 2 p. t. t. oficistoj; 1 llepano. En Serbujo 1 kolego. Entute: 3 Distrikta Sekcioj kun 72 gekolegoj ĉe 43 p. t. t. oficistoj; 17 llepanoj.

Elspezoj: 99.50 din.

Enspezoj: —

Elspezoj: 99.50 din.

Aldono 1 Nomartisto.

Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝticejoj
Sudslava, ŝtata sekcio.

Rogatica 30-an de Okt. 1922.

Lisac
Prezidanto.

Japanujo. En la tiea urbo *Sznoka* okazis somera Espto kurso gvidita de So ingeniero *Tukahaŝi*. En la bone vizitita kaj sukcesinta kurso partoprenis poŝtistaj kamaradoj.



Franca leterportisto en Sudfrancujo en la 70-aj jaroj.

Zagreb (Kroatujo-Jugoslavujo). En la 42-a numero de la tie aperanta „Naŝ Glas“ aperis longa artikolo verkita de nia frato N. Lisac el Rogatica, kiu konatigas la organizacion de „llepo“. Kaj nian „La Poŝtisto“-n. Danko!

Ĉeĥoslovakujo. Dum la XIV-a okazintaj fakaj kunsidoj de la gepoŝtistoj la mandaton por la ĉeĥoslovaka respubliko ricevis S-ro F. Ubert, poŝtdirektoro, Karlsbad, kiu amas sian sekretariojn S-ro F. Ulrich, poŝticejo, Bŭrgstein. En Ĉeĥoslovakio troviĝas nuntempe pli ol 300 gekolegaj esperantistoj. En Ĉeĥoslovakio ĉiuj poŝticejoj devas raportoj (regule ĉiujare je la 15. de aprilo) pri la oficistoj, kiuj — skribe aŭ parole — scipovas fremdajn lingvojn — ankaŭ Esperanton. — Ni esperas, ke la scipovo de Esperanto estos indigota ĉe la kvalifikacio.

La esperanta gazeto „Marto“ Haida, anoncis la „Interligilon de l'ptt“ en la novembro numero.

La sindikata fakgazeto „Gewerkschaft der Postler“ aperigis esperant-germanan alvokon al ĉiuj gekameradoj, por ke ili lernu Esperanton kaj subteni nian poŝt-esperantan movadon (llepo). Ĉi tiu alvoko estos enpresigata en 5000 poŝtkalendarojn, kiujn eldonos la koncerna sindikato.

Danke ni konstatas, ke ankaŭ la fakgazeto „Postalische Rundschau“ afable simpatias kun nia movado kaj volonte presas poŝt-germanajn artikolojn.

La prezidanto de la ĉsl. ŝtata sekcio de l' „llepo“ Sro. Ubert poŝtdirektoro en Karlsbad, vigle propagand-

fajn. Dro Esan ingeniero nun finigis la starigon de tia akceptostacio en Buenos-Aires. La malhelpaĵoj kaŭzitaj pro la meteorologiaj cirkonstancoj estas per aplikoj de la tiel nomitaj *kadroantenoj* facile forigeblaj, tiome, ke la regulan funkciadon preskaŭ nenio malhelpis.

Usona fabrikproduktado de Aŭtomobiloj. La revuo „Scientific American“ publikigis trege interesan statistikon pri la aŭtomobilfabrikado Usona. Laŭ tiu ĉi statistiko oni fabrikis en Usono dum la unuaj 8 monatoj de la nuna jaro 1,667.052 aŭtomobilojn; do per 80.000 plimulton, ol dum la sama tempo de la pasinta jaro. Ĝis la fino de ĉi tiu jaro oni antaŭvideble ĝis 2,400.000 altigos la nombron de la nunjare fabrikitaj aŭtomobiloj.

La Ĉeĥoslovaka Respubliko je la 7-a de novembro aliĝis al la internacia fervoja konvencio.

Aŭtonomio de la Rumanaj fervojoj. El Cluj ni ricevis la sciigon, ke la rumana registaro ordonis al la estraro de la rumana fervojoj, ke ĝi ellaboru leĝ-projekton pri la aŭtonomio de la rumana ŝtata fervojoj; kiu leĝo estus kodifikote je la 1-a de aprilo de 1923.

Torino. (It.) la „Esp. Fervojistaj Unio“ depost la 1. dec. havas sian sidejon kaj lernejon en la centra stacidomo de Torino PN, rajtigita de la „Kompartimenta Direkcio Ferrovie Stato“ (eniro: Via: Sacchi 3).

Wien En la okcidenta stacidomo komenĉiĝis granda kurso, kie 40 kursanoj decidis fondi fervojistan societon. Prepara komitato estas jam elektita kaj klopodas nun konatiĝi kun la eksterlanda Esperantista societo de fervojistoj, Wien XIV, Westbahn-Werkstätte, Avedikstrasse 2.

Trieste. La Kurzo de la tieaj fervojistoj finiĝis. Sukcese ekzameniĝis 30 partoprenintaj fratoj.



KORESPONDO-INTERŜANĜO-DEZIROJ.

(Por abonantoj senpaga rubriko).

So A. de Marich, la redaktoro, de „La Policisto“ (Budapest, IX., Ŭllői-ut 59. IV. 8.) deziras ricevi 1. adresojn de esperantistaj policistoj; 2. adresojn, de nun aperantaj policaj revuoj, bultenoj, jarnibrooj k. t. p. 3. librojn; bildojn; verkojn; artikolojn, aperintajn en revuoj; raportojn; komunikojn nuntempajn kaj tre malnovajn pri la polico, policistoj kaj ilia vivo, laboro evoluo, funkciado k. t. p. 4. sciigojn, informojn, atentigojn pri tre gravaj faritaĵaj farotaj aferoj. 5. adresojn de esperantistaj poŝtistoj, fervojistoj, advokatoj, juĝistoj, juristoj ĝendarmoj, fajrogardistoj. Plue li deziras ricevi interŝanĝe 100–200 diversajn poŝtmarkojn el: Nederlando, Italujo, Svedujo, Norvegujo, Belgujo, Greklando, Turkujo, Romanujo, Bulgarujo Serbujo, Hispanujo, Portugalujo, Svislando kaj eksteraj teritorioj. Por paper kaj metalmoneroj (antikvaj kaj militaj) li donas pmarkojn. Plue li deziras ricevi: majnovajn kaj nove aperintajn librojn pri sekretaj lingvoj; pri steganografio, kriptografio, (kaj similaj sekretaj skribmanieroj); pri pasigrafio, pasillioj, pasilongoj, ideografioj, artefaritaj lingvoj, filozofiaj lingvoj, kompromisingvoj, ludlingvoj, mediumlingvoj fantaziolingvoj, signolingvoj, (kaj similaj).

So I. Frimberger policisto, Wiesbaden, Dotzheimstrasse No. 110. Gth. (Germanujo); deziras korespondadi kun kolegoj kaj interŝanĝas poŝtmarkojn.

So E. Nagel, policisto, Eisenach, Domstr. No. 6. (Germanio); deziras korespondi kun esperantistaj policistoj. Li petas ankaŭ korespondantojn por siaj 9 lok-grupaj membroj.

So Francisko Korányi, policisto, Szombathely, Körmen-di-u. 38. (Hungarujo); deziras korespondadi kun kamaradoj policistaj.

So Aladaro Mokry polica direktoro, estro de la daktiloskopia, Budapeŝt, VIII., Illés-utca 4., 1. 17. (Hungarujo) deziras korespondadi kun fakuloj kolegaj pri daktiloskopio, fotografado.

So Francisko Dudás detektivo, Budapeŝt, I., Váro-k-u. 9. (Hungarujo) deziras interŝanĝi pm. po 100–200 kaj il. pk. (pm. bilfik.) kun eksterlandaj samideanoj.

So R. Bufe ĉefpolicisto, Dresden 6. Frühlingstrasse No. 4. (Germanujo) deziras korespondadi kun aliandaj kamaradoj.

So K. Büttner supera polica komisaro Meissen, Polizeischule Moritzburgerstrasse No 33. (Germ.) deziras korespondi kun kolegoj, precipe aliandaj.

So Gondár Béla pol. oficisto deziras interŝanĝi il. pk. (pm. bilfik.) kun ekst. samideanoj. Rákospalota, lskola u. 116-a (Hungarujo).

So Jac Louter, policisto Wassenaar (Nederlando) deziras korespondi kaj interŝanĝi il. postk. kun eksterlandaj kolegoj.

So Egressy (Ludoviko) policisto, Szombathely, (Hungarujo), Szél Kálmán str. No 7 deziras korespondadi kun eksterlandaj kamaradoj.

So Török (Jenő) tipografisto, Szombathely, (Hungarujo), Templom-tér No 5, deziras korespondadi kun eksterlandaj samideanoj.

So R. Rupčić poŝtekr. en Split (Jugoslavujo-Dalmatujo), Palmira 9, petas la alsendon de esperantaĵoj por la loka klubo kaj por aranĝota granda ekspozicio migronta en ĉiuj dalmataj pli gravaj lokoj.

So A. Miropolsky Budapeŝt, V., Zápolya-utca 38. (Hungarujo) deziras korespondadi kun la tutmonda geesperantistaro pri ĉiuj temoj, kiuj prezentus rimedojn koncernante la plibonigon de l'tutmonda homara vivo entute, — kaj aparte pri forigo la homaĉon kaj starigi konstruon de homeco.

So Francisko Kéder Ujpest, Nyár-utca 73. (Hungarujo) deziras korespondi per I. il. pk. (bil.) kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, monojn, Esperantaĵojn kaj precipe insektojn kaj kreskaĵojn.

So H. Bayer ĝendarm inspektoro, Unken a. Salzburg, (Aŭstrujo) deziras korespondadi kun eksterlandaj samideanoj policistaj kaj ĝendarmaj.

So Zullo-Sante, reĝa gardisto, Torino, Via Ospedale No 2 (Italujo) volas korespondadi kun aliandaj kolegoj.

So Eisenach-aj (Germ.) grupanoj deziras korespondi kun fremdlandaj kamaradoj policistaj: 1. O. Kunzmann, ĉefpolicisto, Neustadt No 29; 2. P. Weimert, ĉ. p., Heinrichstr. No 36; 3. P. Lenhardt, ĉ. p., Hainstein No 9-a; 4. W. Gorschboth, ĉ. p., Lutherpl. No 7; 5. G. Jäger, ĉ. p., Fischerstadt No 34; 6. Fr. Schröter, ĉ. p., Fenkels-gasse No 13; 7. W. Müller, ĉ. p., Filtenstr. No 15; 8. K. Zöller, ĉ. p., Palmental No 8-a; 9. L. Herbst, ĉ. p., Frankfurterstr. No 18; 10. E. Nagel, ĉ. p., grupestro, Domstr. No 6; 11. I. Schott eks. pol., Mühlhauserstr. No 36. Ĉiuj en Eisenach. No 1, 10 interŝanĝas pk. kaj leterojn; No 2, 3, 7, int. pk. kaj pmarkojn; No 4, 5, 6, 8, 9, 11, int. pk.

So Z. Brandt, policisto, Warszawa, Polica, Komandėjo, Senatorska u. No 12 deziras korespondi kun eksterlandaj kolegoj.

So J. Jacob poŝtoficisto en München, 2, N. W. 10 Blütenburgstrasse No 17, I. (Bav.-Germ.) deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun poŝtistaj, policistaj aŭ fervojistaj membroj eksterlandaj de nia ligo.

So E. Muthschall, fervoja super. sekretario, Forst (Laŭsitz-Germ.) Gubener Str. No 28, deziras ricevi fervojajn fakgazetojn nacilingvajn; la tekston de la „Konvencio pri int. transp.“ en fr., it., hol., d., sv., kaj pola lingvoj kaj nacilingvajn regularojn. Li sendas interŝanĝe ilp., germ. gaz., aŭ germ. fakjurnalojn, ankaŭ esperantaĵojn. Petas ankorau la alsendon de fr., it., kaj aliaj limlandaj esp. flugfolioj, kiujn li enmetus en oficialajn skribaĵojn.

So Jozefo Oberhauser, Ujpest, Tél-utca 66. (Hungarujo). Deziras korespondi kaj interŝanĝi Esperantaĵojn, kun ĉiulandanoj.

So H. Scheithauer, policisto, Falkenstein i. V., (Sa.-Germ.), Feldstr. No 18. I., per adreso de So Karl Pfütze, deziras korespondi kun eksterlandaj kamaradoj.

Ĝojiga Sciigo

(Lastmamente alvenio)

Estimataj kaj karaj kamaradoj!

Nia ĝisnuna oficiala organo, kies titolo estis „Fervoja Esperantisto“ ŝanĝis, kiel Vi nem povas rimarki, la posedanton kaj la titolon. La ĝisnuna posedanto mistifikante la estraron kaj la redaktoron de nia asocio per promesoj kaj diversaj aŭspicioj preskaŭ dum la tuta jaro, fariĝis je la fino malkapabla entute eldoni esperantajn gazetojn.

Nia asocio per tio ĉi materiale preskaŭ neoni perdis, sed morale kaj en rilatoj propagandaj kaj organizaj tre, eĉ tro multe. Kiuj pli multe perdis, tiuj estas niaj membroj abonintaj; bedaŭrinde tiuj devas nature nun reboni „La fervojistoj“.

Feliĉe en plej malagraba momento proponis al ni siajn servojn, en Esperantujo tre bone konata samideano, malnova esperantista emi-

mentulo, iam la redaktoro de la esperanta gazeto „La Verda Standardo“, nunatempe la polica ĉefinspektoro en Budapeŝt, sinjoro A. de Marich.

Sinjoro A. de Marich estis direktoro de la internacia revuo „La Policisto“ kun la aldonoj „La Poŝtisto“ kaj „La Fervojistoj“.

Tiu ĉi lasta aldono staras je la disponoj de nia asocio kaj reprezentas de nun nian oficialan fakorganon, kaj estas nature por ĉiu membro obligata.

Tial ankaŭ la abonpagoj por „La Fervojistoj“ apartenas kaj estas de nun sendotaj al la nova posedanto nome:

S-ro A. de Marich, polica ĉefinspektoro, Budapeŝt, IX., Ŭllői-ut 59. IV. 8.

Tion ni denove kaj speciale rimarkas, ke en la kadro de nia fakorgano nepre ne povas esti pritraktataj la aferoj kaj diskutoj politikaj, naciaj, klasaj, rasaj kaj religiaj.

Ĉar nia organo estas la tribunalo, la centro de nia organiza movado kaj faka laboro, tial laboru malkaŝe kune kun ni ĉi frato kaj subvenu nin diligente.

En la venonta numero ni komunikas al nia membraro la statutojn kaj la faritajn decidojn dum la XIV-a universala kongreso de Esperanto en Helsinko, kie estis nia asocio multnombre reprezentita.

Sekve de tio, la landoj elektu siajn asesorojn, poste la asesoroj elektu por sia helpado siajn delegitojn. Tiam la izolaj membroj grupiĝu ĉirkaŭ la delegitoj, la delegitoj koncentriĝu ĉe la asesoroj, tiel ke la tuta funkciado asocia kontaktiĝu per ĉi la asesoroj kun la nuna estraro de nia asocio en Ĉeĥoslovakujo.

Antaŭ ĉio oni legu atente la aldonotan aliĝilon, por ke konfuzoj ne okazu.

La internacia asocio de la esperantistaj fervojistoj dankas sincere en la nomo de siaj membroj al s-ro polica ĉefinspektoro A. de Marich, pro lia afabla helpo kaj oferemo al nia afero.

Ankaŭ ni fervojistoj estas grava kaj respektinda faktoro en la vivo de la moderna homaro.

Tial ni esperantiĝas kaj interfratiĝas kun la policistoj kaj poŝtistoj, la pioniroj de la universala ordo kaj paca laboro.

Por la Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj.

La viceprezidanto

J. Blazek

J. Ivanoviĉ

asocia redaktoro.

La sekretario

J. Barviĉ mh.

E. Kubásek

asocia kasisto.

SALUTO

Mi opinias, ke mi interpretas la ĝeneralan ĝojoplenan senton de nia unusenta kaj unueca familio, kiam mi esprimas elkore al niaj altŝatataj fervojistaj fratoj la plejfelikan bonvenon. Fine ni ĉiuj estas jam kune. Vi eĉ ne imagas tion, kiel gravega estas ĉi tiu, nia unuigo. Nek al oficialaj rondoj, nek al aliaj gravaj faktoroj sukcesis simila intenco. La proksima venonto min pravigos.

Kaj nun Gefratoj, venu la plej serioza, energiega kaj obstina laboro.

Eĉ paŝon Vi ne faru por alia afero; nur por niaj ideoj, ligoj kaj revuo.

En Nürnberg niaj ligoj havos apartajn (fakajn) kaj komunajn kunsidojn. Tie ni renkontiĝos, sed tie ni ĉiuj ekzameniĝos kaj ĉiu devas respondi; kion li faris, oferis por la ĝenerala bono de nia movado.

Konkuru noble dumtempe, kio faros plimulte! Pri nia revuo nur tiom, ke de Vi dependas, ke ĝi faru ĝu plimalmultekosta, pli ofta kaj pliampleksa! Ĝis la revido en Nürnberg! Marich.